6-a JARO, N-o 303

S.A.T.

LEIPZIG, 24. /7. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE	REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).	APERAS SEMAJNE

LA "GENTA" SISTEMO

SENLABORULA SUBTENO LAŬ "GENTA" SISTEMO EN ĈEĤOSLOVAKIO

1. Deveno k enkonduko

Kiel jam diras al ni la nomo, la leĝo devenas de la belga urbo *Gent* (france: *Gand*). En la jaro 1901 regis tie grandega senlaboreco k la urba administrantaro estis devigata pagi gigantajn sumojn al la senlaboruloj. Por ŝpari, la urbo fondis kason, el kiu oni pagis senlaborulajn subtenojn nur al tiuj, kiuj estis anoj de l' tiama fakorganizo. Ĉar oni pagis nur tiom, kiom pagis la fakgrupo k al multaj senlaboruloj estis rifuzita la subteno, la urba administracio ŝparis multe da mono. Sed baldaŭ ĉiuj rimarkis, ke senlaborula subteno laŭ tia sistemo ne sufiĉis dum ĝenerala krizo k baldaŭ la fakorganizoj devis interrompi la pagadon, ĉar malplenaj estis iliaj kasoj. Iom post iom ĉi tiun sistemon enkondukis multaj aliaj urboj k distriktoj por forŝovi de si la pezojn de la subteno.

En la ĉeĥoslovaka respubliko dum la jaroj 1918/1924 estis grandega senlaboreco. La registaro pagis subtenon el ŝtataj rimedoj al ĉiuj senlaboruloj ne posedantaj domon aŭ kampojn. Tio estis tro multe por la ŝparema registaro, oni serĉis rimedon por aliigi tion k ruzulo trovis nun la Gentan sistemon. En julio 1921 estis decidita jam la enkonduko de tiu sistemo en la parlamento, kie kontraŭ-voĉdonis nur la tiamaj socialistaj parlamentanoj. Tamen la registaro ne riskis la enkondukon, ĉar ĝi timis la revoluciemajn senlaborulojn k gelaboristojn. Sed kiam en la jaro 1924 la senlaboreco malkreskis k la kapitalista registaro ne plu timis la laboristojn, oni decidis enkonduki la Gentan sistemon komence de 1. aprilo 1925.

2. Iomete pri la leĝo

Resumo laŭ ĉefaj paragrafoj

Kiu ricevas subtenon k kiu pagas ĝin? Ĉiu ano de la ĉeĥa respubliko, kiu estas membro ĉe profesia organizo, kies regularo enhavas pagon de senlaborula subteno. La subteno konsistas el sindikata k ŝtata parto k estas pagata de la sindikato. Se la senlaborulo estas membro ĉe pluraj sindikatoj, li ricevas subtenon nur de unu organizo. Subtenon oni ricevas nur, kiam oni anoncas sin tuj ĉe maldungo en publika labor-perejo k tie ne ricevas alian laboron laŭ sia kvalifiko aŭ korpostato. Trifoje semajne la senlaborulo devas iri kontrolstampigi sian karton ĉe la policejo aŭ sekretariejo de sindikato. Ĉi lasta povos elpagi senlaborulan subtenon nur tiam, kiam ĝi havas permeson de la ministerio por socia prizorgo (La nova ruĝa tekssindikato post disiĝo de la Internacia Sindikatara Asocio, meze de 1929, ne ricevis permeson de la ministro elpagi la ŝtatan parton de l' subteno k povis pagi nur la sindikatan parton!) Kun la permeso elpagi la ŝtatan subtenon la sindikatoj metiĝis sub la kontrolon de la ministerio por socia prizorgo k por financoj. —

Kiu ne ricevas subtenon? Personoj, kiuj laŭ sindikat-regularo estas rajtigitaj, sed ne estas anoj pli longe ol 3 monatojn (Ĉe ĉiuj sindikatoj estas devo esti membro almenaŭ 52 semajnojn, antaŭ ol oni ricevas iun ajn subtenon). Personoj, kiuj ricevas malsanul-subtenon aŭ kiuj estis maldungataj pro propra kulpo! Dum striko aŭ maldungo rilate al ĉiuj gelaboristoj neniu ricevas senlaborulan subtenon.

Kiu perdas rajton postuli ŝtatan subvencion? — Tiu, kiu rifuzas laboron proponitan de la labor-perejo, kvankam li estas kapabla k la laboro estas pagata laŭ valida salajrtarifo. Ĉiuj, kiuj ricevis dum jaro jam subtenon 3-monatan.

La ŝtata subten-parto estas same granda kiel tiu de l' sindikatoj. La subtensumo ne devas superi du trionojn ($^2/_3$) de la lasta salajro. Ĉiu senlaborulo povas postuli la ŝtat-aldonon komence de la unua tago de sia senlaboreco, je kiu li registrigis sin, se daŭras lia senlaboreco almenaŭ 8 tagojn. La maniero de la enkalkulo estas difinata de la financministro.

Tio resume estas la ĉefaj paragrafoj de la leĝo. Ĉiu leganto povos kompreni, ke la kapitalista registaro ĉiam faras tiajn paragrafojn, kiajn ĝi bezonas por subpremi k ekspluati la plej malriĉajn, la laboristaron k senlaborulojn.

3. Profito de la registaro per la sistemo

Kiel la ŝtato ŝparis k ankoraŭ ŝparas, montras al ni kelkaj statistikaj nombroj:

Jaro	Nombro de la senlaboruloj dum januaro	Nombro de la subtenitaj senlaboruloj dum januaro	Sumo de la subtenoj elpagitaj en ĉeĥaj kronoj[1]
1923	441 075	278 123	333 031 994
1924	193 105	77 524	144 056 921
1925	83 631	28 556 ĝis 1. 4. 25	20 850 000
	Registritaj senlab., al kiuj ne povis peri laboron la ŝtataj labor-perejoj	El ili ricevis subtenon de la sindikatoj kun ŝtat-aldono	Post 1. 4. 25 ĝis jarfino kr.
1925	48 080	4 386	5 867 834

La ŝtato do pagis dum ¾ jaro nur 5 867 834 kronojn al la senlaboruloj. Tio estas la profito de la unua jaro. Tiam diris la sekciestro en la ministerio por socia prizorgo, d-o Rosenkranc (*Rosenkranz*), ke la sistemo

[1] 1 ĉeĥa krono = proks. 0,03 dol.

estas tro nova k ne jam ĝuste enkondukita.

Pli bone ni vidas la profiton, se ni komparas la nombrojn de la jaroj 1926 ĝis 1928 laŭ statistiko de 1-a de februaro ĉi jara.

Jaro	Estis registritaj senlaboruloj ĉe la laborperejoj	Ricevis subtenon	Pagis la sindikatoj inkluzive ŝtata subvencio kr.
1926	61 875	ne montrita	20 032 423
1927	83 721		17 815 457
1928	57 148		13 972 784

Per ĉi tiuj nombroj ni vidas, ke ne estas mirinde, ke la registaro povis plialtigi la armean buĝeton per centoj da milionoj k donis al nia prezidanto T. G. Masarik 20 milionojn kiel naskiĝtagan donacon je la 7-a de marto 1930. Sed ankoraŭ pli klara fariĝas la bildo, kiel malsatas la senlaboruloj kun siaj familianoj, el komparo, kiom da senlaboruloj estis registritaj k kiom da ili ricevis subtenon laŭ tiu malbeninda sistemo. Mi rimarkas tuj, ke por trovi la ĝustan nombron da senlaboruloj, necesas triobligi la statistikajn nombrojn, ĉar ne ĉiuj estas registritaj.

Jaro	k monato	Ne peritaj laborserĉantoj Statistikaj ciferoj	Verŝajna nombro	Subtenitaj
1928	septembro	31 162	98 000	15 950
	oktobro	29 397	90 000	12 866
	novembro	29 919	90 000	12 153
	decembro	39 400	120 000	19 218
1929	januaro	57 148	172 000	19 926
	februaro	55 184	166 000	19 677
	novembro	38 293	115 000	16 715
	decembro	52 809	159 000	29 693
1930	januaro	73 891	222 000	30 085
	februaro	100 000	300 000	ne konata
	marto	88 600	264 000	„ „

Tre klare do montras al ni la nombroj, ke nur ⅓ el ĉiuj senlaboruloj ricevas subtenon, k la aliaj? Ili povas malsatmorti kun edzino k infanoj.

(Finota)

Neustadt a. T.-ano 12 014.

LA ROLO DE SUGESTO EN KLASBATALO

Rigardante la estinton, ni konstatas, ke sugesto ĉiam ludis gravegan rolon en politiko k religio. En pormilitaj agitvortoj, en religiaj principoj, en reĝaj instrukcioj — ĉie ni trovas sugeston je ideoj k perceptoj al la homoj. Ĉiutempe la potenculoj komprenis uzadi sugestojn, ĉu naciecajn, ĉu religiajn, al siaj regatoj. Entute la eklezi-estroj ruzege sugestas primitivulojn per frazoj k "diordonoj".

Kio estas sugesto? Sugesto konsistas en la konscia aŭ nekonscia influado al homamasoj sur anima vojo, sen apliko de logika konvinkigo. La esenco de la sugesto ja ankoraŭ ne estas klare k profunde difinita, ni nur scias, ke ĝi estigas entuziasmon k emocion. Ĝiaj efikoj ofte ŝajnas strangaj, nelogikaj, malraciaj, ne interesokonformaj. Ekzemple dum la solenoj okaze de la "Rejnlanda liberigo" (1-a de julio 1930), kiam la francoj post 12-jara militistara okupado forlasis tiun teritorion, multege da germanoj entuziasmiĝis, ĉirkaŭbrakis k kisis sin reciproke, ne konante unu la alian — k ili ne pripensis, ke jam venonttage ekdaŭros la interbatalo, intertrompo k klasa malamikeco, kiuj neeviteble regas en la kapitalisma sistemo. Ĉu tiu komika sinteno de plenkreskuloj estas aliel klarigebla ol per sugesto de la naciemo? Ĝi superas eĉ la adoremon al klasikuloj, ĉar en Majnc (*Mainz*) oni anstataŭas la monumenton de la fama poeto Ŝiler (*Schiller*) per "liberigmemora" monumento.

Nuntempe ni travivas signifan ŝanĝon de la sugestoj. La malnovaj sugestoj, dikredemo k patriotismo, ekperdas sian potencon; la kapitalismo ne plu kapablas, plene sugesti la homojn. La laborista klaso komencas forĵeti la spiritajn katenojn, ĝi eklernas kritiki. Sed ĉu la sugesto nun tute malaperas? Ne. Ĝi nur aliformiĝas, ĝi nove estiĝas kiel alia, porsocialisma sugesto. Se ni



Por honori la "liberiĝon" de Rejnlando, oni forigas en Mainc (Mainz) la Ŝiler-monumenton k starigas samloke "liberiĝ-monumenton".

ekscias, ke en Sovetio ekzistas manko de nutraĵoj, sed ke la tiea proletaro nelacigeble klopodegas konstrui socialisman sociordon, eble kelkaj inter ni demandas, kiel ĝi dum tiaj cirkonstancoj povas konservi sian optimismon k venkemon. Vivantaj en kapitalisma socio, ni ne plu aprobas malnovajn sugestojn, dum la novaj ankoraŭ ne estas sufiĉe proksimaj al ni. Enplektataj en la leĝoj de l' persona egoismo, ni ofte ne komprenas, ke la sugesto de granda ideo tiom influas la homojn, ke ili mirinde ignoras plej grandajn malfacilojn.

La sugesto mortas k novekestas, ĝi moderniĝas. El sugestoj, devenintaj de malklaraj sentoj, iĝadas sugesto, kiu bazas sur prudento k trankvila pripenso. Sendube la estonta alsocialisma finluktado ne povos malbezoni tiun decidan animan forton.

F. S., Vieno (16 362).

LETERO EL ITALIO

Malgraŭ ĉiaj reakciaj metodoj aplikataj de la faŝismo la komunista partio potenciĝas senĉese sub ĉiu aspekto, precipe inter la kamparana k laborista klaso, kiel eĉ inter metiistoj, kiuj hodiaŭ, ĉu pro ŝtat-impostoj, ĉu pro grandindustria konkurado estas senlaboruloj same kiel granda parto el la aliaj laboristoj. Ĉiuj rilatas tre bone al kom. partio, ĉar ili nun klare vidas, ke nur ĝi sola povos savi ilin el nuna terura situacio. Eĉ la et-bienposedantoj sin orientas al tiu partio. Ankaŭ la etburĝaro, kiu hieraŭ kredis, ke per faŝismo ĝi estus povinta plibonigi siajn kondiĉojn, hodiaŭ ne plu fidas al la nuna reĝimo. Kompreneble etburĝoj ne simpatias la kom. partion, sed tamen ili ne kontraŭas. Ofte inter tiuj homoj oni aŭdas jenajn vortojn: "La komunistoj almenaŭ emas kolektivigi la bienojn, sed la faŝistoj, male, tute senigas nin el nia havo, k devigas nin malsatmorti!"

Nun ni konstatas, ke reformistoj, socialistoj, demokratoj, anarkistoj k katolikoj, precipe de post okazo de ŝtat-eklezia interkonsento, tre bone rilatas al kom. partio k al ĝia organizsistemo. Katolikaj laboristoj aliĝas ĝin pli k pli k fariĝas tre aktivaj. Nun ili estas konvinkitaj, ke nur tiu partio defendas sincere la laboristan klason k ke nur ĝi ekzistas k batalas en Italio malgraŭ ĉiaj faŝistaj persekutoj. La teruraj kondiĉoj altruditaj de l' faŝismo al la itala popolo, la reakcia kruelo aplikata kontraŭ laboristoj k kamparanoj, la pli k pli progresanta malaltigo de l' salajroj, la plialtigo de l' vivkostoj, la ŝtatimpostoj k impost-sistemo akceptitaj de l' registaro k banko: la sumo de ĉe tiuj faktoj, kies konsekvenco estas mizerego, direktas la proletajn amasojn, influatajn de nia aktiveco, al revolucia vojo. Sub mil pretekstoj la laboristoj ne plu respondas al faŝistaj alvokoj. Tiun ĉi fakton oni povas konstati ĉe ĉiuj faŝistaj kunvenoj. El 100 membroj preskaŭ ĉiam nur 7, 8 aŭ 10 ĉeestas la kunvenojn. Ofte, en pluraj lokoj, oni tute ne plu malfermas la pordojn de l' faŝista sidejo. La faŝistoj mem ofte diras, ke tiel oni ne plu povos antaŭeniri. Kiam alvenas iu faŝista rangaltulo, la lokaj faŝistoj serĉas ĉie la laboristojn k kondukas al la faŝista sidejo tiujn, kiujn ili trovas surstrate. Interalie ofte okazas, ke dum la faŝistoj deĵoras ĉe laborejaj pordeg-

oj, por malpermesi la eliron al la laboristoj k devigi ilin honori la hierarkion, ĉi tiuj saltas trans la murojn de l' fabrika korto k forkuras laŭ ĉiuj direktoj.

Parto de l' laborista amaso atendas senpacience la militon por liberiĝi el la faŝismo, sed la kom. partio, ĝis kie ĝi povas atingi, ne lasas disvastiĝi tian iluzion, ĉar kapitalista milito malaperigus la faŝismon nur, se ĝi transformiĝus en revolucion kontraŭ la nuna kapitalisma sociordo. La kom. partio disvastigas la signalvorton, ke por venki kapitalismon k faŝismon necesas aliĝi niajn klasorganizojn, k kiam la kondiĉoj estos oportunaj, forlasi la laboron, iri surstraten, ekkapti la armilojn k eksplodigi la revolucian fajreron. Per konstantaj klopodoj ĝi jam sukcesis konvinki amasojn, ke la espero en por faŝismo fatala milito estas vana. Ĝenerale la laboristoj rekonkeris sian batalemon. Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas esti inter la amasoj.

Malgraŭ la senĉesa elmigrado, la senlaboreco de tago al tago pligrandiĝas, en ĉiu fakindustrio k en la kamparo. Kruele estas trafitaj la salajrkamparanoj, kiuj de post preskaŭ tri jaroj estas senlaboraj k por vivi estas devigataj almozpeti kiel malfeliĉaj kripluloj, kvankam ili estas taŭgaj laboruloj. La plej trafitaj estas la junuloj k la maljuniĝantoj, pro tio ke ili ne jam aŭ ne plu kapablas sufiĉe produkti. Tiuj malfeliĉuloj kun sia familio estas ĉiam nudpiedaj. Iliaj idoj estas tuberkulozaj.

Nenie oni povas trovi laboron k, kiam oni sukcesas ĝin trovi, la salajro estas tiel malalta, ke ĝi nur sufiĉas por manĝi unu fojon po tago, se oni ne havas familion. Ekzemple en kotonfabriko de Udine, kiam oni dungas kelkajn virinojn, oni antaŭe avertas ilin, ke dum ses monatoj ili devos labori por 3 aŭ 4 liroj tage (liro = 0,03 dol.). En kelkaj fabrikoj oni dungas nur dekunu-jarajn geknabojn. En la citita kotonfabriko oni enkasigis dum 1929 ĉ. 15 milojn da liroj per monpuno. La nombro de laboristoj estas 2700. Oni monpunas pro malgravegaj motivoj; ekzemple se oni iomete malfruas en la necesejo, se oni interŝanĝas dum la labortempo kelkajn vortojn, monpunoj pluvas. Salajrkamparano en la Friula regiono ricevas 5 lirojn k tagmanĝon por 13-hora labortago. Masonistoj ricevas 2 lirojn po horo. Helpmasonistoj 1,50 l. po horo, sed ĝenerale kiel helpmasonistojn oni dungas knabojn, kiuj ricevas nur 1 liron po horo. La vivo estas tre kara: pano kostas ĝis 3 liroj po kg., viando de 8—15 liroj po kg., oliva oleo ĝis 10 liroj po litro, labora vesto ĝis 200 l., laborŝuoj de 50 ĝis 100 liroj ktp. Dek liroj egalas proksimume 1 mk. g. Oni kredigas per burĝa gazetaro, ke la memmortigoj, kiuj tre ofte okazas pro mizerego, estas surstrate okazintaj akcidentoj. La prostituo pro la mizera situacio pligrandiĝas senĉese. *Italo.*

BILDOJ EL USONO

LUJ, LOS ANGELES
(Fino. Vidu antaŭan n-on)

Los Angeles estas bone konata, almenaŭ en Usono, kiel hejmo de l' tielnomata "malferma fabriko" (*open shop*)[1]. La mastroj havas organizon nomatan "La Pli bona Amerika Federacio". Sur ĝia emblemo, montranta la aglon, stelojn k striojn, kiel sur la usona standardo, estas la surskribo, supre: "Amerika Plano", k malsupre "Malferma Fabriko". Legu: "La malferma fabriko garantias al la dungito absolutan liberon de oportuna okazo por akiri rekompencon laŭ sia propra individua peno; al la dunginto ĝi garantias industrian liberon ne interrompatan de iu ajn fonto." La gelaboristaro havas motivojn por malbeni tian liberon . . .

Ĉi tie ekzistas apartaj kvartaloj por diversaj rasoj. Ekzistas limigoj kontraŭ la neblankuloj. Kelkloke ili rajtas posedi domon, sed ne mem loĝi en ĝi. Aliloke ili povas nek enloĝi nek posedi domon. Aktoj entenas ofte kondiĉojn kiel tiajn: "Neniu parto de l' nomita konstruo povos iam ajn esti vendata, transdonata aŭ luigata al iu persono de neblanka raso."

Sekvantaj statistikoj montras la kialojn de senlaboreco: En 1923 Los Angeles enhavis ĉ. ¾ milionon da loĝantoj, k novaj konstruoj en tiu jaro valoris 200 133 181 dolarojn. En 1929, kiam la loĝantaro, laŭ la Komerca Ĉambro, nombris 1 427 480 personojn, la novaj konstruoj valoris nur 93 016 160 dol. Novaj konstruoj por la 3 unuaj monatoj ĉi-jare valoris nur 20 058 841 dol., dum lastjare por la sama tempospaco ili valoris 27 690 403 dol. Lastjare pli ol 100 novaj fabrikoj estis malfermataj. Pli ol 150 malnovaj fabrikoj estis pligrandigataj. La moninvesto por tiuj fabrikoj estis pli ol 25 milionoj da dol. En tiuj fabrikoj ĉ. 5000 gelaboristoj trovis laboron k ricevas ĉiujare nur sumon de 7,5 milionoj da dolaroj. La produktado valoras ĉiujare pli ol 50 milionojn da dol. Inter la 5000 gelaboristoj estas kompreneble enkalkulitaj multaj altsalajraj administrantojn, kiuj verŝajne kune ricevas tiom, kiom la ceteraj laboristoj. Multaj personoj alvenas ĉi tien pro la bona klimato reklamita de la Komerca Ĉambro. Ĉiuj ĉi faktoj klarigas, kial ekzistas en Los Angeles 175 000 senlaboruloj.

Kelkaj nombroj pri maŝinoj: En la ferindustrio 7 personoj produktas hodiaŭ samon kiel 60 antaŭe. En aliaj branĉoj 2 produktas tiel multe kiel 128 antaŭe; 1 tiel multe kiel 42 antaŭe. Maŝino anstataŭas 600 vitro-blovistojn. Brikmaŝino fabrikas ĉiuhore 40 mil brikojn, dum viro hore produktas 56 brikojn. Virino per maŝinoj produktas same multe kiel 45 mil virinoj antaŭe per radŝpiniloj.

"Niaj treege bonaj metodoj ebligas al ni maldungi grandegan nombron da gelaboristoj. Estas ordinara afero por ni enkonduki maŝinon, kiu per 6 homoj produktas tiom, kiom 50 aŭ eĉ 100 homoj produktis antaŭe. Kio okazas al la gelaboristoj forpelitaj, tio ne koncernas nin. Nia devo estas fari ĉion eblan por forigi funkciojn, ne krei ilin. Nia celo estas mono, ne pli k pli da homoj, sed malpli k malpli da ili." Tiel pensas k parolas la usonaj mastroj.

Ĉi-jare la registaro nombras la loĝantaron, k por la unua fojo en la historio de Usono oni kalkulas ankaŭ la senlaborulojn. La homnombristoj ricevas pokape 4 cendojn. En lokoj, kie ili ne trovas hejme la loĝantojn, ili postlasas respondilojn. Se multaj plenigus tiun respondilon, same kiel unu el la loĝantoj de mia loko, la statistikoj pri senlaboreco ne multe valorus. Kvankam li ne laboris dum multaj monatoj, li nenion respondis pri senlaboreco. Oni diras, ke en najbara urbo, Pasadena, oni ne nombras senlaborulojn, ĉar ĉiuj loĝantoj estas aŭ negocistoj aŭ eksnegocistoj!

[1] Entrepreno, kies mastro forpuŝas sindikatanojn k prefere dungas nesindikatanojn. — *Red.*

MI VOLAS SCII . . .

K-do 11 989 dezirus tre scii, kion pensas K-doj k precipe K-do Lanti pri la gravuraĵo, kiu lokiĝis en la 300-a n-o de "S-ulo" (pĝ. 454)[1], k ĝenerale pri gravuraĵoj similaj presitaj, ofte, en la franclingva gazeto "Monde"?

[1] Temas pri desegno de *Georgo Grosz.*

AL LA KUNLABORANTOJ DE ESPERANTO-SERVO!

Pro kaŭzoj, pri kiuj ni ne havas respondecon, ni estis devigataj malampleksigi la gazeton. Vi sekve bone komprenas, ke nun la loko tute mankas por aperigo de speciala paĝo por Esperanto-Servo. Tiu nia decido estis konigata al ties gvidanto, K-do Bässler, la 7. VII. 30, k ni komisiis lin enmeti mem noton pri tio en la gazeto. Al tio li ne konsentis; tial ĉi supra informo aperas sub la nomo de la

Direkcio.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 17. – REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. – Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

Gek-doj partoprenontaj la Londonan Kongreson, ne forgesu viziti la fakkunvenon de la liberpensuloj. Proponojn k dezirojn faru tuj al nia sekretario.


ESTU KONSEKVENCA!

En fino de la jaro 1928 la konata pentristo-artisto Georgo Gros *(Grosz)* estis akuzita pro blasfemo. Li estis publikiginta 17 desegnojn titolitajn "Hintergrund. 17 Zeichnungen für die Aufführung des Schwejk in der Piscatorbühne" (Fundo. 17 desegnoj por la prezentado de "Ŝvajk" en la Piskator-scenejo). Pro tri el la 17 desegnoj la prokuroro faris kontraŭ li proceson. La ĉi apuda bildo, unu el la cenzuritaj bildoj (n-o 9), prezentas "la elverŝon de la sankta spirito".

Ĉi tie mi ne volas priparoli la sencon k la plenumon de la bildoj. Ili estas trafaj k mi jam ofte vidis kopiojn de la bildoj dum liberpensulaj manifestacioj sur stratoj k en kunvenoj. Ni ŝatas tiajn artistojn batalantajn per sia arto kontraŭ la hipokrituloj.

Sed mi devas mallaŭdi la sintenadon de Gros; ĉar, malgraŭ ke li per sia arto kontraŭbatalas la eklezion, li persone ankoraŭ estas membro de la protestanta eklezio, sekve li morale k mone subtenas institucion, kiun li malestimigas. Gros deklaris antaŭ la juĝistaro je la demando, ĉu li estas membro de iu eklezio aŭ ĉu li interne aŭ formale estas libera de ĝi: "Membro de iu destinata eklezio interne mi ne estas." Prezidanto: "Ĉu vi estas formale ankoraŭ membro?" (Gros: "Jes.") "Kaj al kiu eklezio vi apartenas?" Gros: "Al la protestanta."

Jen ni havas la salaton. Unuflanke li forte kontraŭbatalas la eklezion, aliflanke li subtenas ĝin eĉ mone per sia membreco. Estas disharmonio ĉe li inter pensado k agado. Li sekve nur estas spritulo. Kaj la ekleziuloj ridas kaŝe. Homo, kiu ne agas, kiel li pensas, estas malkonsekvenca; li kastras sin spirite. *K. H.*



ATEISTA MOVADO EN BARNAŬLO (SOVETIO)

La laboristoj de l' urbo Barnaŭlo same kiel laboristoj en aliaj urboj de USSR, havas grandan celadon al scienco. La socikultura agado bezonas multe da ejoj por kluboj, bibliotekoj, kinematografejoj, diversaj kurs-lernejoj por laboristoj ktp., sed la necesaj domoj por kultur-oficejoj ne sufiĉas, ĉar la kreskado de l' kulturmovado antaŭvenas konstruadon de domoj por kulturaj oficejoj. Samtempe en Barnaŭlo estas dek preĝejoj, bonegaj domoj, okupitaj de l' eklezio. En ĉiuj preĝejoj partoprenas diservadon po unu — du dekoj da eklezianoj. Konsiderante tiun situacion, la gelaboristoj pasintjare komencis postuli de l' urba soveto fermigon al kvin preĝejoj, sed ĝis nun estas fermita nur unu sola, en kiu nun troviĝas bona klubo por ruĝarmeanoj.

Dum nuna jaro la Barnaŭla Konsilantaro de Sendiuloj (ateistoj) en pli ol 200 diversaj kunvenoj de gelaboristoj raportis "pri socialisma konstruado k malhelpo de religio". Ĉiuj kunvenoj rezoluciis postuli de la urba soveto k distriktestraro la permeson: demeti sonorilojn por transdoni ilin al la industrio, kiel valoran necesan metalon; same la kunvenintoj postulis de l' urba k distrikta administracio fermi la preĝejojn.

Ĉar la administracio malrapidis plenumi la postulon de l' laboristaj kunvenoj, la Barnaŭla societo de ateistoj turnis sin al ĉiuj urbanoj k enpresis en loka ĵurnalo la peton, ke ĉiuj Barnaŭlanoj voĉdonu por la aprobo aŭ malaprobo de la ĵus nomitaj postuloj laboristaj. En Barnaŭlo estas 36 mil loĝantoj, kiuj rajtas partopreni en elektoj de l' Urba Soveto. (Rajtas partopreni en elektado al urba soveto k voĉdoni ĉiuj gelaboristoj, geoficistoj, gekamparanoj senescepte, personoj de liberaj profesioj. Senrajtigitaj estas: privatkomercistoj, eks-estroj de polico k ĝendarmoj, eks-militestroj, ekspluatistoj, pastroj, alivorte ĉiuj, kiuj ne volas labori, sed volas aŭ volus suĉi sangon el laboruloj.)

Ĝis nun jam partoprenis en la voĉdonado 24 310 personoj. El ili 23 919 personoj postulis tuj demeti la sonorilojn k fermi la preĝejojn por diservado, sed malfermi ilin kiel kultur-oficejojn. Nur 391 personoj deklaris, ke ili volas preĝi k protestas kontraŭ fermiĝo de preĝejoj. Inter la 391 personoj estas preskaŭ ĉiuj gemaljunuloj, kiuj havas aĝon de 56 jaroj k pli, maljunulinoj estas 260.

La voĉdonado ankoraŭ daŭras, tamen oni ne dubas, ke granda parto da laboruloj ne plu volas preĝi, ne volas aŭskulti la sonojn de sonoriloj. La laborularo estas ne konsentema, ke 52 mil kilogr. da valora metalo senutile pendu en aero sur Barnaŭlaj preĝejoj. La gelaboristoj devigos la urban soveton (urbadministracion) plenumi siajn postulojn: transdoni al la industrio ĉiujn sonorilojn, fermi ne malpli ol kvin preĝejojn k organizi kultur-oficejojn en estintaj preĝejoj.

Ne miskomprenu la kondiĉojn de l' ateista movado en Barnaŭlo. Neniu malpermesas al eklezianoj diservi; ĉiu, kiu volas, ĉu li estas laboristo, ĉu kamparano, ĉu oficisto aŭ mallaborulo, senriske povas viziti preĝejon k dipreĝi, sed dank' al granda klerig-laboro de l' kultur-oficejoj granda parto da laboruloj en USSR jam liberiĝis el la religia opio: ili jam ne plu kredas al pastroj k ne volas esti kiel "diaj ŝafaĉoj", kiuj ne scias, kien ili iras aŭ kien gvidas ilin la pastroj. Tio estas la kaŭzoj pri la kontraŭdiaj postuloj de l' gelaboristoj.

Kompil-verkis A. Kuliĉenko (12.876).

Ĵus aperis! JACK LONDON
LA FERA KALKANUMO
Tradukita el la angla de G. Saville.
368 paĝoj. Formato 12×18 cm.
Prezo 2,60 mk. g., (bindita 3,20 mk. g.)
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, aŭ Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

TRA ESPERANTIO

ĈIRKAŬ LA TRAKTOR-AFERO

La alvoko de Gek-doj Batta (en n-o 299 de "S-ulo") pri la Dua Traktoro necesigas kelkajn gravajn rimarkojn. La bonefiko de ilia postulemo — publikigo de la artikolo sen iu ajn mallongigo — devigas min esti same postulema kiel ili: mi *postulas*, ke ankaŭ mia respondo aperu sen iaj ŝanĝoj k mallongigoj. Inter krampoj mi demandas, ĉu la SAT-anaro permesos ankoraŭ longtempe, ke premo, minaco aŭ simpla postulemo de iu partifrakcio pezu senĉese sur la sufiĉe penigan laboron de nia redakcio?

La alvoko de Gek-doj Batta entenas ok proponojn.

La unua ŝajnas al mi tute ne akceptebla. La Direkcio de SAT estas gvidantaro de *superpartia* organizo. Postuli de ĝi, ke ĝi "publikigu sian sintenon" rilate al tiu afero ("plej baldaŭ"—ĉu tio ne similas ultimaton? signifas trudelpremi *politikan* decidon de estr-organo, kies devo estas laŭstatute, resti neŭtrala inter la diversaj tendencoj de nia anaro[1]. Oni ne diru, ke traktoro estas nepolitika aĵo: ankaŭ maŝino fariĝas politikaĵo, se oni ĝin uzas por partipropagando. Ĉu povas ekzisti dubo pri tio, ke la traktorpropono de Gek-doj Batta celas frakcian agadon inter la SAT-anaro?

La dua propono estas same malakceptinda kiel la unua: SAT ne povas oficiale subteni iun frakcion nek partion. Ĝi povas simpatie *allasi* kolektojn ktp. Sed estante superpartia organizo, ĝi ne povas partopreni al partiagitado. Al tiu lasta servas la partifrakcioj el membroj de SAT. Nia Asocio ja ne havas nur bolŝevikajn membrojn: al ĝi apartenas ankaŭ komunistoj nebolŝevikaj, socialdemokratoj ktp. Pro tio mi kontraŭstaras la proponon, ke "estu eldonataj presitaj (aŭ multobligitaj) 'kolektlistoj' numeritaj *flanke de SAT*".

La tria propono ŝajnas al mi akceptebla, kondiĉe ke la publikigo de la kolektitaj sumoj *ne* estu prezentata kiel *oficiala* entrepreno de SAT.

La proponoj 5, 6, 7 k 8 estas interna afero de la bolŝevika frakcio el SAT-anoj k sekve ne interesas nin.

La kvara propono de Gek-doj Batta ŝajnas al mi la plej diskutenda. Ke la inaŭguro de la traktoro okazu en Moskvo, tio estas afero de la bolŝevika frakcio k min ne interesas. Sed la propono aranĝi nian XI-an Kongreson en Moskvo, bezonas tre seriozajn k longajn pripensojn.

Principe mi ŝatus, ke Moskvo estu nia kongresurbo en la venonta jaro. Sed praktike mi vidas multnombrajn malhelpojn, tiel ke mi konsentus elekti Moskvon nur je la sekvantaj kondiĉoj:

1. La Soveta Registaro ebligu al la sovetiaj SAT-anoj la viziton de SAT-kongresoj ekster Sovetio. Ĝis nun ĝi preskaŭ malebligis tion per postulo de 250 rubloj (= 3000 frankoj aŭ 500 germanaj markoj aŭ 25 funtoj sterlingaj) por unu pasporto, per rifuzo de valuto al la vojaĝemuloj, k ofte per rekta rifuzo de pasporto.

2. La Soveta Registaro permesu liberan montranssendon por aliĝoj al SAT, por abonoj k aĉeto de SAT-eldonaĵoj.

3. La Soveta Registaro garantiu, ke *ĉiuj* SAT-anoj, k *ne nur* ortodoksaj bolŝevikoj, povu l i b e r e vojaĝi en la landon de Oktobra Revolucio, k ke ili povu — plej grave! — l i b e r e *forvojaĝi*.

Oni povus respondi, ke en 1926, ĉiuj SAT-anoj, de iu ajn tendenco, povis ĉeesti nian Leningradan kongreson. Certe, mi mem tion vidis. Sed, de 1926, la situacio ŝanĝiĝis. La malliberejoj sovetiaj pleniĝis je K-doj apartenantaj al ĉiuj tendencoj de la laborista movado. La italan anarkiston Ghezzi (mi citas nur unu ekzemplon) oni senmotive ĵetis en malliberejon. La komunisto Blumkin estas mortpafita, ĉar liaj ideoj ne estis konformaj al la deziro de la bolŝevika partisekretario Stalin. Socialistoj estas tenataj en malliberejo pro siaj *ideoj*, *ne pro faroj*.

En la mondo ekzistas SAT-anoj (la plejmulto!), kiuj estas nebolŝevikoj. Ili deziras k rajtas ĉeesti la SAT-kongreson. Ĉu ili povos? Ĉu oni donos al ili la vizon? Ili ja estas, laŭ la bolŝevik-ortodoksa vortaro, "renegatoj", "kontraŭrevoluciuloj", "instrumentoj de l' imperialismo", "duonfaŝistoj"!!! Kaj se la Soveta Registaro donos la vizon, kiu garantios, ke tiu vizo valoros por Moskvo? Ĉu ni ne devus timi, ke tiu vizo nin kondukos rekte, ekzemple, al Alma Ata (ekspunekzilejo de Trocki) aŭ en la "straton de *libero*" (ho ironio!) de Tobolsk, kie Karl Radek troviĝis en punekzilo?

Nur se mi havus klarajn, decidajn, firmajn garantiojn pri tiuj tri kondiĉoj, mi konsentus akcepti Moskvon kiel kongresurbon k konsili al la SAT-anoj, tien veturi.

Estas penige, diri ĉion tion, k speciale por mi, kiu subtenas la sovetan Revolucion ekde la unua tago. Sed la tutmonda laboristaro devas scii la veron, k pli ol iam Sovetio mem devas esti defendata kontraŭ siaj malamikoj. Tiu volo, ĝin defendi malgraŭ ĉio, malgraŭ ĉiuj mispaŝoj, eraroj k eĉ krimoj de ĝiaj gvidantoj, povas resti viva en la tutmonda proletaro nur se ni montras per niaj kritikoj, k ne nur per blinda aplaŭdo, ke la afero de la sovetia laborularo estas la afero de la laboristoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj kontinentoj. *L. Lora (Revo), SAT-ano 1267.*

[1] La Direkcianoj rajtas nature agi laŭplaĉe kiel *individuoj*. Sed iliaj faroj kiel Direkcianoj de SAT, je la nomo de SAT, devas esti absolute neŭtralaj. Donacante jam monon por traktoro, la Direkcianoj agis laŭ sia bontrovo en la limoj de nia Statuto. Tion mi plezure k aprobe konstatas. Sed ili ne rajtas, per *oficiala* gesto, kiel postulis Gek-doj Batta, influi la anaron en iu senco.

VOĈOJ DE SAT-ANOJ

Ni k Sovetio

"SAT estas maskita komunista entrepreno, ĝi laboras per "ruĝa oro", ni aŭdas ĉiun tagon de niaj klasaj malamikoj. Kaj kiom diferenca de tio estas la vero! Preskaŭ tute kontraŭe, estas Sovetio, kiu laboras per nia mono.

Ĉiam ni servis al Sovetio. La plej multaj artikoloj, aperintaj en "S-ulo", certe temis pri ĝi. "LNE" dediĉis al ĝi tutajn kajerojn. SAT-anoj monkolektas por traktoroj al sovetiaj K-doj ktp. Kaj kiel ĉi tiuj entuziasmaj, aktivaj, akurataj klasbatalemaj K-doj rekompencas al ni? Per daŭra subtera laboro kontraŭ nia gvidantaro, per pamfleto kontraŭ Lanti, per rompo de Göteborga Konvencio, per obstrukco kontraŭ "LNE" (de la Moskva red.) k per netranssendo de ŝuldata mono.

Mi esperas, ke ĉi tio nur estas malluma flanko de ekĝermanta socialismo. Aliel ja estus pli feliĉe vivi en kapitalisma mondo, kie profito, mensogo, malkonkordo k rabado estas oficialaj.

Estas tute nekompreneble, ke iuj Gek-doj povas opinii, ke estas bele "ke en Sovetio veturas traktoroj, kiujn ni pagis, kiam samtempe la gvidinstancoj de l' "proleta patrio" ridas k ĉikanas nin, proletojn de la tuta mondo.

H. N. (11 082), Odense

Kiel aranĝi militon? Konsiloj por homoj, kiuj ŝatas militojn

Multaj laboristoj ne plu volas militi pro ia ajn patrio, sekve estas trovendaj novaj militigaj unuoj. — Unu vojo, kiu tutcerte kondukas al milito dezirata estas jena: Oni eduku parton el la homaro socialdemokrate k alian parton komuniste. Jam en la infankorojn oni plantu malamon kontraŭ la alia partio. Tio okazu plej bone laŭ mondpartoj: ekz. la okcident-eŭropa homaro fariĝu socialdemokrata k la orienta komunista. Kiel superaj instancoj povus funkcii, por la orientaj komunistoj la orientaj petrol- k nafto-societoj; kiel superajn instancojn oni elektu la petrol-reĝojn de la aliaj landoj por

la socialdemokratoj. Iamajn oficirojn caristajn oni varbu por aranĝi la aferon, sed ili ne agu tro publike en okcidentaj landoj, ĉar la pro mizero akrigita vido de la okcidenta proleto povas eble ekkoni ilin. Tiam oni zorgu, ke ĉiu kredu, ke la alia partio estas la kulpulo, k la milito povos komenciĝi.

Schweinfurt, 28. junio 1930.

8384.

RAPORTARO DE LA PLENUMKOMITATO DE SAT

pri la agadjaro 1929/30 (1. julio — 30. junio)

Ni atentigas, ke pro manko de loko la raportoj povas presiĝi nur en tre resuma formo.

B) RAPORTO DE LA ADMINISTRACIO DE SAT

Situacio de la membraro. La statistiko[1] estas farita la 10. julio 1930 k enhavas nur tiujn membrojn, kiuj fakte pagis la kotizon por la kuranta jaro.

Sume rekotizis aŭ novaliĝis en la jaro 1930 4899 aktivaj k 77 pasivaj membroj, sume 4976. Ne rekotizis ĝis la 10. VII. 2701 membroj, inter ili granda parto el Sovetio, kies kotizojn ni ĝis nun ne ricevis pro la jam konataj kaŭzoj; aliel la statistiko havus tute alian aspekton.

Sennaciulo. Ni ne ripetas ĉi tie la staton de la abonantaro, ĉar en n-o 297 ni donis detalan statistikon pri la situacio de la abonantaro ĉe la ekspedo de n-o 242 k ĝis la 1. julio la stato de l' abonantaro preskaŭ ne variis. Sed okaze de nia 10. Kongreso ni donas ĉi sube statistikon pri la evoluo de l' abonantaro al "S-ulo" ekde ĝia naskiĝo, kiu sendube interesos multajn el niaj membroj k abonantoj:

Komence de kvaronjaro		*Fino de kvaronjaro*
2701	Oktobro 1924	2073
844	Januaro 1925	2064
1670		2073
1416		1940
1302		1961
1107	Januaro 1926	2088
1398		2003
1356		2232
1687		2322
1329	Januaro 1927	2719
2068		2763
2063		2751
2066		2806
1785	Januaro 1928	3181
2306		3275
2454		3229
2331		3267
1634	Januaro 1929	3604
2571		3690
2754		3626
2730		3703
2100	Januaro 1930	4143
3454		4140
3024	n-o 301	

La Lernanto. — La eldonkvanto de ĉi tiu gazeteto estas *11 900* ekzempl. De ĉi tiu kvanto aĉetas GLEA 5000 ekz., NEFL 1000 ekz. k FEO 250 ekz. La ceteran kvanton ni almetis "S-ulo"n k dissendis al apartaj abonantoj, kies kvanto estas 80.

[1] La laŭlandaj nombroj, kompare kun j. 1929, estos legataj ĉe la Kongreso k aperos presite en la kongr. protokolo.

La Nova Epoko. — Pri tiu revuo ni same ne donas statistikon, ĉar ankaŭ kompleta statistiko aperis en n-o 297 de "S-ulo". Sed por klare montri ankaŭ ĝian evoluon, ni citu la ekspedkvanton ekde oktobro 1924 (siatempe ankoraŭ "Sennacieca Revuo"). Ni vidos, ke la varioj estas tute malgrandegaj.

Jen la diversaj kvantoj, kiujn ni ekspedis ĉiumonate, inter ili ankaŭ kelkaj duoblaj n-oj. Por ne uzi tro la lokon, ni citas la ciferojn kurante: Ĉe oktobro 1924 ni komencas la citadon. 1693, 1220, 625, 951, 1020, 1054, 1236, 1235, 1114, 1114, 1140, 915, 1040, 1157, 1106, 1260, 1200, 1200, 1024, 1186, 1256, 1281, 1206, 1177, 1325, 1222, 1171, 1216, 967, 980, 1080, 1014, 1040, 1014, 1067, 1077, 1016, 1054, 1030, 946, 996, 704, 1039, 1239, 1291, 1317, 1353, 1439, 1405, 1373, 1384, 1176, 1275, 1253, (januaro 1930 949, 1213, 1216, 1242, 1245, (junio 1930) 1279 ekz.

Jarlibro. — Fine de januaro k komence de februaro ni ekspedis la Jarlibron 1929/30. Por ŝpari afrankon ni parte sendis la jarlibrojn kolektive al perantoj aŭ malnovaj membroj kun la peto disdoni ilin. La plej granda parto el ĉi tiuj K-doj tre kontentige disdonis la librojn, k ni ŝuldas al ili dankon por ĉi tiu servo, farita al la Asocio. Sed kelkaj perantoj, ĉefe en Sovetio, trankvile lasis la librojn hejme en iu angulo k ne disdonis ilin. Dum la lastaj kongresoj ni insiste petis, ke la K-doj en la plej diversaj lokoj elektu perantojn k sendu informojn pri kunvenejo ktp. Kiom obeis ĉi tiun peton? Tre malmulte. Sed estas nepre necese, ke en ĉiuj lokoj, kie troviĝas pluraj membroj, oni elektu peranton k vicperanton. Tiu ĉi afero ne nur simpligas nian laboron k ŝparigas afrankon, sed estas ankaŭ helpilo por informpetantaj K-doj. — De la ekspeditaj jarlibroj revenis 83 ekz., kiuj ne trafis la ricevonton, ĉar li ŝanĝis la adreson. Ni do petas niajn membrojn ĉe adresŝanĝoj tuj informi nin, por ke ni povu registri la ŝanĝon.

Eldona fako de SAT. Ni volonte donus ĉi tie statistikon pri venditaj libroj, sed bedaŭrinde ni ĝis nun ne ricevis la raporton de nia Moskva agentejo pri la provizo tiea, sen kiu nia statistiko estus nekompleta. *Insignoj.* Ĝenerale nia nova insigno trovis plaĉon ĉe niaj membroj. Bedaŭrinde estas, ke ĉi tiu varo estas impostebla, aliel ni povus vendi multe pli grandan kvanton. Ni vendis dum la administra jaro: gr. insignoj, — provizo pasintjara: 3357, provizo nuna: 1402, venditaj 1955. Malgr. insignoj: provizo pasintjara: 144, plus novmendo estas sume 1154. Provizo nuna: 1021, venditaj 133.

Akcibiletoj. Dum la lasta admin. jaro ni vendis 629 akcibiletojn el la serio A k el la sama serio oni resendis 16. El la serio B ni vendis 51 k oni resendis 8. Pri la valoro de ĉi tiu instalo ni ne bezonas diskuti, ĉar jam multaj K-doj spertis ĝian utilon, ĉu kiel ŝparilon ĉu kiel pagilon.

Konsiderante la evoluon de nia movado ni povas esti kontentaj, k pli kontentaj ni povus esti, se la moninterrilatoj kun Sovetio estus la samaj, kiaj ili estas en aliaj landoj. Kiam ni ricevis la informon, ke la financkomisaro malpermesos sendon de nia mono, ni ne plu akceptis abonojn k membrokotizojn de niaj klientoj en Sovetio. Liveri fremdajn librojn ni jam ĉesis pasintan vintron, tuj kiam ni eksciis la novan buĝeton al ni faritan. Same en marto-aprilo ni ankaŭ ĉesis sendi niajn proprajn librojn, insignojn, kovertojn, poŝtkartojn, por ne tro grandigi la sumon ĉe nia konto en Moskvo. Kompreneble ni nun ricevas multajn petojn de niaj sovetiaj klientoj daŭrigi la ekspedon de la gazetoj, sed niaj K-doj certe komprenos, ke ni sen mono ne povas liveri ion ajn. La momentan k definitivan saldon de nia konto ni nur povos pli malfrue citi, ĉar ĝis nun ni ne ricevis la raporton el Moskvo, kiun oni promesis sendi la 10./7. 30.

C) RAPORTO DE LA REDAKCIO DE "SENNACIULO"

La gazeto aperis regule en amplekso de 12 paĝoj. Nur tiuj numeroj, al kiuj estis almetata "La Lernanto", aperis dum la lasta duonjaro 8—10-paĝe. Kiel jam raportite en la 300-a n-o, la nombro de abonantoj je 201 superis 4000 la 30. 5. 1930. Laŭ enhavo aperis originaloj: 297 grandaj artikoloj + 17 Tagoj el mia Vivo + 30 pli malgrandaj notoj + 2 versaĵoj; do sume 346 originaloj (lastjare — 347). Aperis krome 33 (lastj. 31) kompiltradukitaj artikoloj, kies dokumenta materialo ofte estis ĉerpita el diversaj fontoj. Aperis 45 (lastj. 45) tradukoj. En la serio "Historio de l' Socialismo" aperis 4 artikoloj (lastj. 16). En la statistiko pri originala materialo ne estas entenitaj la t. n. Fakpaĝoj (sporta, virina ktp.), nek la artikoloj de l' rubriko "Tra Esperantio", en kiu meze po n-o estis 2 grandaj artikoloj.

En 46 n-oj el 52 troviĝis la Fakpaĝoj (meznombre ĉiu Fakpaĝo aperis 9-foje). La Paĝo de l' Esperanto-Servo

estis en ĉiu n-o de post 1. okt. 1929; sekve estis 39 n-oj ĝis 30. VI. 30.

En nacilingvaj gazetoj represiĝis (tiom, kiom oni informis nin) 165 (lastj. 190) artikoloj el "S-ulo". Sed oni konsideru, ke ne estas enkalkulita la materialo peresperanta el la Paĝo de l' Esp. Servo. La represitaj artikoloj rilatis al: Sovetio — 26, al Usono — 18, al sennaciismo, milito k parencaj problemoj — 17, al Japanio — 9, Polio — 8, Germanio — 7, kontraŭreligiaj — 7, literaturaĵoj — 6, Tagoj el vivo — 5, ktp.

Kiel ĉiujare, ni instigis la K-dojn diri siajn sugestojn, kritikojn, sian opinion pri nia gazeto. La kelkajn opini-esprimojn ricevitajn ni publikigis en "S-ulo". Oni ne kritikis lingvon k stilon en tiuj artikoloj, sed nur tiun aŭ alian artikolon, fakon aŭ rubrikon de la gazeto, kiu ne plaĉas al tiu aŭ alia K-do. Ni ripetu, kion ni jam diris ofte, ke al ĉiuj plaĉi estas tute neeble, k estas normale, ke ne ĉiuj havas la saman guston. Tial ni klopodis kiel eble plej variigi la enhavon de "S-ulo", enkondukante "pordistran" materialon, malgrandajn notojn, k se spaco permesis, felietonon. Bedaŭrinde eĉ ĉe 12-paĝa amplekso ni ne povas enmeti ĉion, kion ni dezirus aperigi, k ni ne povas tiom variigi la enhavon per trakto pri ĉiuj flankoj de la homa socia vivo k homa penado, kiom estus necese, por vere sufiĉe bone solvi niajn edukajn k kulturajn taskojn.

Kiel ankaŭ en pli fruaj jaroj, la materialo ricevita el Sovetio estis precipe abunda; tiel ni povas statistiki en tiu ĉi jaro la aperon de 52 artikoloj pri Sovetio, krom 8 "Tagoj el mia Vivo", priskribitaj de sovetianoj, k ne enkalkulante la prisovetian materialon aperintan sur la Fakpaĝoj. Necesas akcenti, ke ĉiuj artikoloj estis favoraj pri Sovetio k ke pri negativaj flankoj en la Sovetia vivo estas presita preskaŭ nenio. Efektive, ni devas konfesi, ke ni enmetis favoran materialon pri Sovetio, ĉar ni konsideris, ke aperas sufiĉe da malfavora materialo en burĝaj gazetoj. Ni tamen devas konstati, ke precipe sovetianoj mem plendis pro abundo de artikoloj pri Sovetio. Tio estas bone komprenebla, ankaŭ tio, ke de ekstersovetiaj K-doj ni ne ricevis similajn plendojn. Sed inter ĉi lastaj kelkaj plendis al ni tre energie pro tio, ke la raportoj pri Sovetio estas ĉiuj laŭdaj k sekve ne prezentas tute ĝustan bildon pri ĝia situacio. Pri tiu punkto tute speciale ni deziras ricevi de la Kongreso klaran direkton por la estonto.

Ĉe la sojlo de l' nova raportjaro (komenco de julio) aperis la 300-a numero de "S-ulo", en kies kompilo la Redakcio estis tre bone subtenata de libervolaj kunlaborantoj, kiuj per siaj artikoloj k desegnoj helpis krei tute orginalan k SAT-spiritan 16-paĝan numeron. Ni esperas, ke ĉiu notis tion kun kontento.

Sed jam ĉe la fino de tiu ĉi raportjaro, en junio, antaŭĵetis sian ombron okazo ekstreme grava, laŭ financa k ankaŭ — morala vidpunkto, kiu malfaciligas la antaŭeniradon de l' Asocio k kompreneble ankaŭ de ĝia oficiala organo: la malpermeso transsendi monon el Sovetio, k kiel konsekvenco la neeblo liveri nian gazeton al sovetiaj Gek-doj. Se tiu stato ne ŝanĝiĝos, tio signifos, ke ni perdus 1100 abonantojn k sekve refalus en la situacion, en kiu ni estis ĉe la komenco de l' jaro 1928.

10-a KONGRESO DE SAT

en Londono (Britio), 3.—7. aŭg. 1930

5a listo de aliĝintoj

N-o	Nomo	Lando	SAT-matrikulo
173.	*G. Huggins,*	Anglio,	*8215*
174.	*C. Huggins,*	Anglio,	*14 821*
175.	*V. Strijak,*	Sovetio,	*5634*
176.	*A. Page,*	Anglio,	*16 164*
177.	*K. Page,*	Anglio,	*16 165*
178.	*O. Koth,*	Germanio,	*12 943*
179.	*E. Koth,*	Germanio,	*16 774*
180.	*E. Hubert,*	Polio,	*13 529*
181.	*H. Schubel,*	Germanio,	*13 450*
182.	*M. Stockl,*	Aŭstrio,	*6826*
183.	*O. Spitsenstatten,*	Aŭstrio,	*14 551*
184.	*J. Ramacher,*	Germanio,	*7850*
185.	*A. Jadlovker,*	Sovetio,	*6771*
186.	*K. Rauchhaus,*	Germanio,	*2269*
187.	*W. Mager,*	Nederlando,	*14 641*
188.	*N. Lakerveld,*	Nederlando,	*13 604*
189.	*J. Wis,*	Nederlando,	*15 474*
190.	*L. Burkhard,*	Germanio,	*15 532*
191.	*E. Tindell,*	Anglio,	*13 255*
192.	*L. E. Hesse,*	Anglio,	*4273*
193.	*P. Grünberg,*	Germanio,	*4230*
194.	*R. Schinkel,*	Germanio,	*135*
195.	*J. Urlich,*	Belgio,	*10 049*
196.	*A. Jurgensen,*	Sovetio,	*15 255*
197.	*I. Kaŝin,*	Sovetio,	*15 125*
198.	*A. E. Zabojev,*	Sovetio,	*10 369*
199.	*H. Laŭfer,*	Germanio,	*10 754*
200.	*K. Grünbaum,*	Germanio,	*15 924*
201.	*E. N. Palakova,*	Sovetio,	*6806*
202.	*F. Deiters,*	Germanio,	*264*
203.	*F. Azorin,*	Hispanio,	*3681*
204.	*F. Reim,*	Germanio,	*16 182*
205.	*G. P. de Bruin,*	Nederlando,	*670*
206.	*J. Heenw,*	Nederlando,	*13 142*
207.	*B. France,*	Anglio,	*508*
208.	*C. Wild,*	Anglio,	*14 916*
209.	*H. Birch,*	Anglio,	—
210.	—,	Kubo	*15 135*
211.	*C. Hawksworth,*	Anglio,	*7688*
212.	*F. Mawson,*	Anglio,	*12 895*
213.	*O. Groves,*	Anglio,	*7553*
214.	*S. R. Basford,*	Anglio,	*16 082*
215.	*P. Slater,*	Anglio,	*16 083*
216.	*G. Slater,*	Anglio,	*10 511*
217.	*A. Watson,*	Anglio,	*15 419*
218.	*H. Hyams,*	Anglio,	*15376*
219.	*J. Cooper,*	Anglio,	—
220.	*A. Schröder,*	Germanio,	*14 073*
221.	*H. Probst,*	Aŭstrio,	*13 388*
222.	*N. Lvov,*	Sovetio,	*14 543*
223.	*G. Kother,*	Nederlando,	*15 712*
224.	*I. Polak,*	Nederlando,	*16 194*

(Daŭrigota. Aliĝis pli ol 400 K-doj.)

Bicikla karavano al Londono

ekveturos de Köln (Germ.) la 30. julio trans Aĥen (Aachen) — Bruselo — Ostende. Gek-doj dezirantaj partopreni estas petataj anonci sin antaŭe pro prizorgo de loĝejo en Köln, al K-do Fritz Löw (6817), Hacketäuerstr. 30, *Köln-Mülheim.*

ANTAŬKONGRESO EN BRUSELO (BRUXELLES)

3a (lasta) komuniko

Ni konigas al la Gek-doj kelkajn informojn, kiuj povus utili al ili: *Monkurzo:* 1 hol. guldeno = 14,40 belg. frk., 1 mk. g. = 8,50 fr., 1 aŭstra ŝil. = 5,05 fr., 1 ĉeĥa kr. = 1,06 fr., 1 svisa frk. = 6,90 fr., 1 franca frk. = 1,40 fr. *Veturprezoj per fervojo* de: Herbesthal ĝis Bruselo (Bruxelles) fr. 34, de Arlon ĝis Bruselo fr. 49, de Bruselo al Ostende fr. 30. Prezo de tagmanĝo aŭ vespermanĝo 7 ĝis 10 frk. *Horaro por vagonaroj al Londono* (La Bruselaj K-doj foriros sabaton, 2-an de aŭg., per vagonaro de 7,30 h. matene.) Bruselo (Nordo) 7,30 h., Ostende (alveno) 9,50 h., foriro per ŝipo 9,30 h., Dover (mare) 13,48 h. Londono (Viktoria) — 15,40 h. La ŝipo foriranta de Ostende je 10,45 h. ne prenas sabate vojaĝantojn kun rabatbiletoj. Alia vagonaro ekiras de Bruselo (Nordo) — 12,45 h., Ostende — 14,34, foriro per ŝipo 15,40, Dover (mare) 19,38, Londono (Vikt.) 21,26 h.

K-doj alvenantaj en Bruselon por la Antaŭkongreso sin turnu al Tramista Domo (*Maison des Tramwaymen*), 17 rue du Poinçon, *Bruxelles.* Estos K-doj, kiuj deĵoros tie dum kelkaj tagoj.

PROPONOJ AL LA 10-a KONGRESO

12. Ni proponas, ke la XI-a SAT-kongreso okazu en la jaro 1931 en Moskvo, en la ĉefurbo de la tutmonda revolucia Proletaro. *Motivigo:* Jam dum la Leipziga Kongreso regis la deziro okazigi iun plej proksiman kongreson de SAT en Sovetio, por doni eblon al centoj da ekstersovetiaj Gekdoj viziti la unuan socialistan landon k vidi proprokule la konstruadon de Socialismo. Same ni donos okazon al niaj sovetiaj Gek-doj konatiĝi kun ni, ĉar la kapitalistaj registaroj ne permesas al ili viziti la SAT-kongresojn okazantajn en burĝaj landoj.

246, 2921, 5380, 5484, 3217, 8568, 483, 4377, 15 525, 3317, 5704, 13 493, 15 219, 5352, 8700, 8698, 14 989, 14 770, Berlin (fino de junio).

13. Por eviti ĉiujn pluajn malfacilojn inter la Asocio SAT k Sovetio rilate monaferojn, mi proponas transloĝigi la Sidejon k Redaktejon al Moskvo.

H. Martz (14 157), Crimmitschau.

14. Raportoj jam publikigitaj en "S-ulo" ne estu laŭtlegataj en la kongreso. *Motivigo.* Ni opinias, ke per tio ni ŝparas multan valoran tempon. Ĉiu kongresano legis la raportojn en "S-ulo" k do povis antaŭe noti siajn rimarkojn, demandojn ktp. Tiuj partoj el la raportoj, kiuj eventuale ne taŭgus por publikigo en "S-ulo", povas esti legataj kiel aldono.

670, 5877, 1939, 1940, Enschede.

15. La sekvonta Jarlibro aperu en la 3-a kvarono de 1931 kiel Jarlibro 1931—32. *Motivigo.* Pro la decido, ke aktivaj SAT-anoj devas esti abonantoj al "S-ulo", la nombro da *aktivaj* SAT-anoj verŝajne grave malpliiĝos. Nova Jarlibro aperonta en la komenco de 1931 do ne povos enhavi multajn adresojn. La fakto, ke mono el Sovetio ne plu estas transpagata, grave malsanigas la financan staton de SAT. Per aperigo de unu Jarlibro en 2 jaroj, ni atingos: unuflanke, ke ĝi enhavos pli da nomoj k do havos pli da propaganda valoro k aliflanke, ke la financa stato de SAT pliboniĝos.

670, 5877, 1939, 1940, Enschede.

16. En rubriko "Nia Poŝto" de "S-ulo" la redaktoro informu ĉiusemajne pri la sorto de ricevitaj manuskriptoj, en tia formo: Aperos en venontaj n-oj artikoloj de K-doj ... (sekvas matrikuloj); ne aperos artikoloj de ... (same). Kiam kunlaboranto sendas plurajn artikolojn, li numeru ilin, k la red. citu ĉiujn n-ojn post la matrikulo de l' membro. *13 607, Zeist.*

ATENTU! VEGETARANOJ-SAT-ANOJ!

Koncernas nian fakkunsidon dum la X-a Kongreso

Gek-doj veturontaj al Londono, tuj ekrilatu kun la sekciestro. Por denove ebligi k sukcesigi fakkunsidon k nian kulturan laboron, ni nepre tuj bezonas vian kunlaboron. La sekciestro mem ne povas viziti la X-an pro senlaboreco. Kiu estas preta transpreni la gvidadon de l' fakkunsido? Kongresvizitontoj k nevizitontoj tuj sendu proponojn k opiniojn pri aranĝo de l' kunsido, pri nia Sekcio k nia plua laboro. Jam preparu vin por vigla utila raportado! Kolektu materialon! (Nevizitontoj raportu letere rekte al la Veget. Sekcio dum kongreso en Londono. Tien ankaŭ sendu ĝustatempe proponojn pritraktotajn dum nia kunsido.) Por disvastigi k antaŭenpuŝi nian ideon k movadon, mi intencas aranĝi ekspozicion dumkongresan. Tio kondiĉas, ke ĉiu sendu indan materialon, ekz. gazetojn, librojn ktp., ĉu esp-ajn, ĉu nacilingvajn; krome afiŝojn, fotojn el la movado k. a. Ankaŭ kondiĉo estas, ke troviĝu laborema K-d(in)o, pref. el Anglio, kiu transprenos la aranĝon k ĉian antaŭlaboron. Britaj (Londonaj) vegetaranoj estas speciale alvokataj interrilati kun la sekciestro. Skribu i. a. pri vivkondiĉoj ĉefe tuŝante la flankon de laŭnatura vegetara nutrado; sciigu al kongresontoj tian manĝejon (gastejon). Kelkaj eksterl. samcelanoj dez. ekrilati kun Londonaj vegetaranoj. Do — aŭdigu vin k helpu agrabligi la restadon de viaj gastoj.

La sekciestro: *O. Walter, Kleinschönau 21,* apud Zittau, Germ.

FAKKUNSIDO DE L'JUNULARA SEKCIO

Ankaŭ dum la Londona Kongreso la Junularo aranĝos specialan kunsidon, kiun ĉiuj gejunuloj (eĉ maturuloj kun junulecaj koro k spirito) partoprenu. La planita k dezirita tendara kunvivado ankoraŭ ne realiĝos ĉi-jare. Tial ni interrilatis kun O. K. K. por provi almenaŭ havigi al la gejunuloj komunan restejon, se iel eble senkostan. La taskoj de l' fakkunsido estos: ekzameni la faritan laboron (post raporto de estro k redaktanto) k konkludi la laboron farotan. La tagordo entenas la raportojn de gvidanto k red., novelektojn, trakton de niaj plej proksimaj taskoj (i. a. diskuton pri speciala kreinda porjunula bulteno proponita de la red.), raportojn el div. landoj k a. La gravo de nia sekcia laboro necesigas plenan partoprenon de ĉiuj konsciaj laboremaj junulojkongresontoj. Pli detalajn sciigojn donos al interesiĝantoj la prez. de l' kunsido: K-do *W. Latimer*, Carlisle-Cumberland, Canal Bank, Bone Mill Cottage, Anglio.

KELKAJ KLARIGAJ VORTOJ

Rilate la proponon voĉdonitan de la Pariza Grupo k publikigitan en la n-o 301-a de "S-ulo", ni konstatis per leteroj ricevitaj, ke ekzistas miskompreno ĉe kelkaj K-doj. Iuj havas partiecan intereson ŝajnigi nekomprenon pri tio, ke la Pariza Grupo k la Direkcio de SAT ne estas la samaj organoj; aliuj ĉagreniĝas pro tio, ke la Direkcio de SAT ŝajne ne plu havas la fidon de la Pariza Grupo. Necesas do diri tute klare, ke nek la ŝajnigita suspekto de la unuaj, nek la ĉagreniĝo de la duaj estas fundamentitaj. Tre certe la Kongreso en Londono konfirmos tiun nian aserton. Ni aldonu, ke nur 2 Direkcianoj (K-doj Glodo k Kaŝon) ĉeestis tiun kunvenon. Tial ke tiu propono rilatis la estraron de la Asocio, tiuj du K-doj sin detenis en la voĉdonado. Krom la tri voĉoj, kiuj kontraŭis, estas notinde, ke relative multaj K-doj sin detenis.

Direkcio de SAT

LA PLENA VORTARO DE ESPERANTO

estas ekspedita, la 5. julio 1930, rekomendite, al ĉiuj, kiuj ĝin page mendis (escepte al sovetianoj; vd. pri tio "S-ulo"n n-o 299). Jam kelkaj pakaĵoj revenis, pro diversaj kaŭzoj kiujn ni konigas ĉi sube inter krampoj. Ni avertas tiujn mendintojn, ke ni ree sendos la libron nur kontraŭ antaŭpago de l' ekspedkosto: K-doj Schneider R., Bad Wildungen Land, Neulok" Post Neubringhausen (nekonata), 0,70 mk. g. (afranko); Huet, 4 rue des Brulio, Le Raincy (foriris), 14,50 frk.; Angles Jose, Restaurant Bourdier, Cours Sextius, Aix en provence (foriris), fr. 2.50; ankaŭ foriris de adreso: Union du Sud-Est, Saint Cyr s/Mer, fr. 2.50; Eiglmaier J., Ländgasse 141/1, Landshut (rifuzita), 1.50 mk. g.

NIA POŜTO

Al kelkiuj. — Kion mi respondus al demando pri eventuala aliĝo de SAT al ia I. F. A.? Mi miras, ke malnovaj SAT-anoj povas direkti al mi tian demandon. Kiam antaŭ la Kasela Kongreso kelkiuj proponis, ke SAT aliĝu al la III-a Internacio, mi paradokse respondis, ke tio ne estas ebla, sed ke la III-a, II-a k. ĉ. Internacioj k similaj organizoj povas aliĝi al SAT! (Vd. punkton 5 de la Statuto). Mia opinio ne ŝanĝiĝis ... *E. L.*

5087. — Nur, se vi verkus tre koncize aŭ sendus nur la plej interesan fragmenton, ni povus promesi utiligi.

7998. — Mankas loko por via "festotago". *Red.*

7037. — Via abono validas ĝis 312.

13 194. — Via anonco kostas 1.80 kr.

Tetelbaum. — La Adm. de SAT ne sendas kongreskartojn, tion faras la kongreskomitato. *Adm.*

KORESPONDADO

LITOVIO

Mi serĉas ie k ian laboron en fabriko, mi estas fervojisto k terlaboristo. Dankante mi restas: Esperantisto Julis Kaĉinskas, *Radviliŝky,* Sakalausko g-ve 6, Ŝiauliu.

SVEDIO

Kiu rusa K-do, veturonta al aŭ de la deka Kongreso, volas viziti Svedion? K-do kiu kapablas publike paroladi estas preferata. Tuj resp. al K-do Artur Lundgren, Furutorpsgat. 57, *Hälsingborg* (13 194).

KONGRES-ALIĜINTOJ, NOTU!

La Organiza Kongr. Komitato aranĝis kun Julio Baghy eldonon de speciala tre malkara eldono de la jam fama verko **"VIKTIMOJ"**

La kosto de tiu libro estas 2 ŝilingoj, k nur kongres-aliĝintoj rajtas aĉeti je tiu prezo. La libro estos vendata en la Kongresejo, sed tiuj, kiuj aliĝis k ne vizitos Londonon, povas mendi ĝin ĉe la Kongres-sekretario, 19, Leyton Rd., *Harpenden,* Herts., Anglio. Sendu 2 ŝil. 3 pencojn. La oferto validas nur ĝis fino de aŭgusto.

Kongresontoj atentu!

Gek-doj, kiuj post la X. kongreso traveturos Germanion, havas la eblon pasigi kelkajn tagojn senkoste en nia bele lokita urbeto Valdenburg, Saksio. Pro informoj turnu vin tuj al Lab. Esp. Grupo Valdenburg (Saksio). Skribu al: Max Pohlers, *Waldenburg-Altstadt,* Gartenstrasse 142.

ENHAVO

	paĝo
La "Genta" sistemo	479—80
La rolo de sugesto en klasbatalo	480
Letero el Italio	480—81
Bildoj el Usono	481
Sennaciula Liberpensula Paĝo	482
Tra Esperantio	483—86

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)